

Teksto - muziko:

Imre SZABÓ

László ZSOLDOS

VANKUVERO VIN BRAKUMAS!

(Salutkanto al la partoprenantoj de la 69a UK)

REKANTAJO

F **C7**

Bon - ve - non, bon - ve - non, bon - ve - non Por

F **C7** **F**

ni ĉi - uj, Bon - ve - non, bon -

C7 **F** **C7** **F**

ve - non, bon - ve - non Por ni ĉi - uj.

VERSO

C7 **F**

1. Van ku - ve - ro	vin bra - ku - mas	Tra la
2. Fi - loj de la	vas - ta mon - do	Sim sa
3. Sa - ma ling - vo	nin kun - te - nas	Por la
4. Ku - ne luk - tas	ni por bo - no	Por es
5. Ven - ke flu - gas	ni - a kan - to	En la
6. Van ku - ve - ro	nin bra - ku - mas	Tra la

C7 **F** **Gm** **C7**


ko - roj ĝo - jo lu - mas	A - mi - ke - co nin kun -
lu - tas en ĉi ron - do	A - mi - ke - co nin kun -
pa - co ni man - pre - mas	A - mi - ke - co nin kun -
ton - to de la ho - mo	A - mi - ke - co nin kun -
ling - vo es - pe - ran - to	A - mi - ke - co nin kun -
ko - roj ĝo - jo lu - mas	A - mi - ke - co nin kun -

F **G7** **C7**

fan - du	Kaj ni ĉi - uj ku - ne kan - tu :	Bon -
fan - du	Kaj ni ĉi - uj ku - ne kan - tu :	Bon -
fan - du	Kaj ni ĉi - uj ku - ne kan - tu :	Bon -
fan - du	Kaj ni ĉi - uj ku - ne kan - tu :	Bon -
fan - du	Kaj ni ĉi - uj ku - ne kan - tu :	Bon -
fan - du	Kaj ni ĉi - uj ku - ne kan - tu :	Bon -



1984-3-102
starto



Karlovy Vary
Jáchymov
Jánské Lázně
Luhačovice
Františkovy Lázně
Teplice v Čechách
Třeboň
Teplice nad Bečvou
Mariánské Lázně
Podšbrady
Jeseník



ŜLOSILO AL VIA SANO ĈEĤOSLOVAKAJ BANEJOJ



KURACRESTADOJN EN ĈEĤOSLOVAKAJ BANEJOJ CERTIGAS
KAJ PLUJN INFORMOJN PRI UNUOPAJ BANEJOJ DONAS:

BALNEA, reprezentace československých lázní a zříděl,
Pařížská 11, 110 01 Praha 1, ČSSR
Telex 122 215, Telefon 263 777

DOKTORO FRANTIŠEK KOŽÍK 75-JARA!



Li naskiĝis la 16-an de majo 1909 en Uherský Brod, en naskiĝloko de Jan Amos Komenský /Komenio/. Li studis licean gimnazion en Uherské Hradiště /Moravio/ kaj en Brno. Tie li finfrekventis en la jaro 1931 la juristan fakultaton; samtempe li finis studojn ĉe Konservatorio kaj estis studento de Filozofia fakultato. Li laboris dum du jaroj kiel juristo-aspiranto. Ano de la radio en Brno li estis dum jaroj 1933 - 1940. Dum tiu tempo li estis membro de la t.n. VERDA STACIO, kiu elsendadis multajn programojn en Esperanto. Poste li laboris kiel dramaturgo en Prago, ĝis 1951.

Poste li verkis libere, sen havi certan postenon. Li laboris, paŭzante certan periodon, en fako de dramaturgio, aŭ en filmo. Multflanke talentita artisto. Pro siaj literaturaj kvalitoj li ricevis honoran titolon "merita artisto".

La bibliografio de liaj verkoj enhavas pli ol 100 volumojn. Li kreas kaj verkas spontane kaj facilmaniere, sed tio estas nur surfaca saĝo. Li estas plej laborema verkisto de nia epoko. Li kapablas verki, auskulti radion, spekti televid-programon, legi ĵurnalojn, ktp.

Komence li poetis. Li eldonis pli ol dek poezilibrojn /Dor-noza stalaro, 1930, Matena ĉaso, 1933/, ktp. Sed baldau lin "kaptis" temoj teatraj, radioskecaj. Poste li verkis rakontojn, romanojn, eseojn, librojn por infanoj, film-scenarojn, operajn kaj operetajn libretojn. Majstre li regis ĉiujn literaturajn ĝen-rojn. Liaj dramverkoj por radio kreis novan epokon de radio-dramaturgio. La unua sukcesplena verko estis la biografio de Cristobal Colon /Kolumbo/, 1934. Pleje li eminentis en branĉo de biografiaj romanoj, kies ĉho ĉe la kritiko preskaŭ ne kom-pareblas kun multaj aliaj aŭtoroj. La plej konata kaj legata estas la romano pri la glora pieroto Gasparo Debaurau, kies pa-trino estis ĉeĥdevena. La romano, unue eldonita en la jaro 1939, jam multfoje reeldoniĝis. Pri la portugala bardo Camões, pri pentristo Josef Mánes, pri vivkariero de Cervantes, pri pentristo Jaroslav Čermák /Katenoj de la fideleco/. En temoj ne mankas ankaŭ komponisto Leoš Janáček kaj pentristino Zdenka Braunerová. Ankaŭ aliaj personecoj de la ĉeĥa nacia kulturo fariĝis objektoj de lia intereso: Komenský, Kryštof Harant, J. Kajetán Tyl, Karolo la Kvara, aktoro Josef Vojan, ktp.

Li verkis ĉe pure historian prozon /ekzemple pri la grupo de mezepokaj aktoroj en Flandrio/, pri vivo de fikcia ĥetmano el 17-a jarcento /Super valo matenigas/. Li verkis ankaŭ por la junulara publiko, pri sportmodelaj personecoj /Emil Zátopek

rakontas/. Konata estas ankaŭ lia novelo "Rentgenbildo de la koro: normala." Multaj el cititaj verkoj estas ciam reeldona - taj.

Sanon, vivenergion kaj senĉesan simpatian de viaj legantoj deziras al vi membroj de Literatura sekcio de ĈEA, kies vi estas honora kaj ŝatata prezidanto.

J. Karen

PROGRAMLABORO DE ARTLITERATURA SEKCIO DE ĈEA ESPERANTO-ASOCIO EN LA JARO 1984 - 1985

SEPTEMBRO 1984:

Diskuto kiel altnivele tra-
duki en Esperanton kaj en la
ĉeĥan lingvon.

OKTOBRO 1984:

Diskuto kiel altnivele ver-
ki en la ĉeĥa kaj internacia
lingvoj /poezio, kantoj, pro-
zo, dramo, eseo/.

NOVEMBRO 1984:

Diskuto:
a/ kiel respeguliĝas tiu tema-
ro en la ĉeĥa kaj Esperan-
ta literaturoj,
b/ kiel internacie propagi re-
zultojn de nia kultura aga-
do.

DECEMBRO 1984:

Kunveno ne okazas.

JANUARO 1985:

Kunveno ne okazas.

FEBRUARO 1985:

Pri la tradukado en Esperan-
ton kun specimenoj kaj pri ia-
ma kunlaboro kun Prof. Miloš
LUKÁŠ /s-ino Matyková/.

MARTO 1985:

Pri la preparata libro "Me-
zinárodní řeč - utopie a fak-
ta /PhDr. Jaromír JERMÁR, CSC./;
inviti Prof. Zima.

APRILIO 1985:

Informo pri la publikaĵo de
la aŭtoroj URBANOVÁ, RUMLER, KA-
REN kaj VIDMAN: "Kvarfolio"/Ur-
banová/; pli detala informo
pri la laboro rilate al sino-
nima vortaro /Vidman/.

MAJO 1985:

Kritika analizo de la tra-
duko de la libro "Báseň neu-
mírá" de merita artisto d-ro
František KOŽÍK en la traduko
de Jiří Karen /Karen/.

JUNIO 1985:

Kritika analizo de la libro
"Poeto fajrakora" de Marjorie
BOULTON /Rumler/.

JULIO 1985 - AŬGUSTO 1985:

Kunvenoj ne okazas /ferioj/.

REMARKOJ:

- laŭeble envicigota parolado
de redaktoro Ivo ŽELEZNY pri
scifi-literaturo en Esperan-
to;
- intersaĝo de la unuopaj pro-
gramoj ebla;
- ĉiuj kunvenoj de Artliteratu-
ra sekcio de ĈEA okazas la
trian /aŭ la lastan/ sabaton
enmonate je la 14,00 horo en
klubejo de KEP, Prago 1, Vej-
vodova strato n-ro 1;
- la invitiloj regule dissen-
dotaj;
- kiu interesiĝas el la nein-
vitataj aŭ jam matene volas
ricevi la invitilon, sciigu
tion al g-ino Tatána KRISTO-
FOVÁ, postkesto 660, 111 21
PRAGO 1.

Artliteratura sekcio de ĈEA,
Jiří Karen

KARL MARX KAJ FRIEDRICH ENGELS PRI LA "LANGUE UNIVERSELLE"

1. "UNIVERSALA LINGVO" KAJ "INTERNACIA LINGVO"

1983 estis proklamita la Karl-Marx-jaro. Marx, unu el la plej grandaj pensuloj de la homa historio, naskiĝis 1818 kaj mortis 1883. Do 1983 oni omagis al heroo kaj pro la 165-a naskiĝtago kaj la 100-a mortotago. Konsiderante, ke la verko de Marx ne estas disigebla de tiu de Engels, estus interese de-
mandi sin, kiun rilaton la du klasikuloj de la marksismo-leninismo havis al la problemo de internacia lingvo, se entute ili havis rilaton al ĝi. Versaĵne iom kleran respondon ni ne rice-
vus, se ni nur serĉus iujn citaĵojn pri tio. Ni ankaŭ devas kon-
sideri la rilatojn de Marx kaj Engels entute al la lernado kaj
utiligado de fremdaj lingvoj. Plue ni devas konsideri, ke la
esprimo "internacia lingvo" ankoraŭ ne estis disvastigita dum
la tempo de ilia vivo. Oni skribis pri la "universala lingvo"
kaj ĉefe celis pri lingvo sola, kiu estus parolata de la tuta
homaro, kiel oni trovas aludojn en malnovaj sociaj utopioj 1/
aŭ kiel DESCARTE, LEIBNIZ kaj aliaj 2/, kiuj unugvide rigardis
la kreadan lingvon helpilo por pli racia, pli "gusta" pensa-
do. Krome oni komprenis sub "universala lingvo" ankaŭ la duan
lingvon la "helplingvon", kiun oni lernus kaj uzus apud la ge-
patra. SCHLEYER nomis sian Volapük "Universalsprache für alle
Erdbewohner", kvankam li pensis fakte pri dua lingvo, uzenda a-
pud la gepatra. Tamen, la termino estas ankaŭ uzata en la kla-
sika verko de COUTOURAT/LEAU 3/ kaj eĉ en la moderna libro de
BAUSANI 4/. Sed kaj COUTOURAT/LEAU kaj BAUSANI kompreneble
sciis distingi inter la universala lingvo por la lingve unueca
homaro sur unu flanko kaj la internacia /do dua/ lingvo sur
alia flanko. Interese estas, ke la komplementiga verko de COU-
TOUTOURAT/LEAU 1907 jam portas en la titolo la esprimon "Langue
internationale" 5/.

En la verkoj de Marx kaj Engels ni ne trovas indikojn, ĉu
ili konsciis pri la ebla maleca signifo de "universala lin-
gvo" kaj "internacia lingvo".

2. LINGVOPROJEKTOJ EN LA TEMPO DE MARX KAJ ENGELS

Ke Marx kaj Engels daŭre en la praktiko konfrontiĝis kun la
lingva problemo, estas konate. Ili venkis la problemon lernan-
te multajn lingvojn. Pri ilia eminente scio de fremdaj lingvoj
oni trovas multajn indikojn en iliaj verkoj. Lastatempe aperis
libro pri la sinteno de Marx kaj Engels pri lingvo, stilo kaj
tradukado, en kiu oni kolektis multan interegan materialon 6/.
Al la demandoj antaŭe starigendaj apartenas ĉu entute en la
tempo de Marx kaj Engels la problemo de universala /aŭ inter-
nacia/ lingvo jam ekzistis en la publika konscio, kaj ĉu jam e-
stis konataj iuj konkretaj projektoj. Nu - la problemo de uni-
versala lingvo certe nur en limigita grado estis en la publika
konscio, eble nur ĉe relative malmultaj pensuloj kaj verkis-
toj. Oni ne povas diri, ke en la tempo de Marx /1818-1883/ kaj
Engels /1820-1895/ la problemo de internacia lingvo estis for-
te debatita kvazaŭ internacie solvenda tasko.

/Daŭrigo./

NOTOJ:

- 1/ Kp. Rátkai, Á. /1978/: Socialismaj teorioj kaj la interna-
cia laborista asocio pri la universala lingvo. En: Blanke,
D. /1978, Red./: Socipolitikaj aspektoj de la Esperanto-mo-
vado. Budapeŝto /HEA/, p. 13 - 30.
- 2/ Kp. Drezen, E. /1931/: Historio de la mondlingvo, Leipzig,
/EKRELO/, 28 - 32, 44 - 45, 51, 53, 54.
- 3/ COUTOURAT, L./LEAU, L. /1903/: Histoire de la langue uni-
verselle. Paris, /2-a eldono 1907/, represo komune kun 5/
ce Olms-Verlag, Hildesheim 1979 /kun aldono de R.Hauptenthal/.
- 4/ BAUSANI, A. /1970/: Geheim- und Universalsprachen. Entwick-
lung und Typologie. Stuttgart.
- 5/ COUTOURAT, L./LEAU L. /1907/: Les nouvelles langues inter-
nationales. Paris.

PRI SIMILAĴOJ INTER LA FINNA LINGVO KAJ ESPERANTO

Konata estas la fakto, ke Esperanto similas surfac-struktu-
re la okcidenteuropajn lingvojn /vortare, prononce/ kaj mez-
strukture la orienteuropajn lingvojn /ekz. gramatike/, sed mal-
pli konate estas, ke ĝi profundstrukture similas ekz. al la
cina lingvo /ekz. nevariaj radikoj - ilustra ekzemplo: wo = mi,
wode = mia, women = ni, womende = nia!/.
La finna lingvo apartenas, kiel ĝenerale konate, al la fin-
no-ugraj lingvoj, al kiuj en Eŭropo apartenas ankaŭ la hunga-
ra kaj la estona. La finna kaj estona estas tre proksimaj, ti-
el ke preskaŭ senpene oni povas reciproke kompreni, sed la hun-
gara kaj la finna same malproksimas kiel la rusa kaj la angla.
En diversaj epokoj la finna lingvo enprenis multajn elementojn
de la najbaraj lingvoj: slavaj kaj germanaj. Kiel tipajn prun-
tojn el la slavaj lingvoj, precipe el la rusa, mi menci-
u kelkajn tute ordinarajn vortojn: majakka /lumturo/, leipä /pano/,
sininen /blua/, ikkuna aŭ akkuna /fenestro/ kaj en la vulgara
lingvo estas ankaŭ tre multaj pruntoj: sapuska /mangaĵo/, holo-
tna /malvarma/, ktp kun pli-malpli torditaj sencoj kaj orto-
grafioj.

El la germanaj pruntoj mi menci-
u kelkajn: kaunis /bela/kp.,
svedan "skön" kaj germanan "schön",
rengas /ringo/, lääkäri -
kuracisto kp. svedan läkare,
dum ekz. la estona prunteprenis la
germanan "Artzt". La finna kiel
"konservativa" lingvo konser-
vis multajn pravortojn en tre
originala formo, kio estas tre
interesa fenomeno por la studantoj
de la hindo-eŭropa kompara
lingvistiko.

Esperanto kaj la finna lingvo
havas multajn komunajn traj-
tojn strukture kaj vortare. Tio ne
estas mirinda afero, ĉar Zamen-
hof ĉerpis al sia lingvo multajn
elementojn ĝuste el la
orienteuropaj lingvoj, kiuj influis
multe ankaŭ al la finna. Ekzistas
c. mil komunaj vortoj: sama, masto,
paperi, kassa, radio, nimi /nomo/,
ktp en la komuniza vorttrezoro.
La finaĵo de la pluralo de la oblikvaj
kazoj estas en la finna -i-, ekz.
talossa = en domoj, -ssa respon-
das al la esperanta prepozicio -
EN. La "rekonilo" de la paseo estas
la sama -i- /tamen en la

finna lingvo estas ankaŭ kompleksaj
verboformoj perfekte kaj pluskvam-
perfekto/, ekz. minä rakastan = mi
amas, minä rakastin = mi amis,
cetere la esperanta "mi" estas kvazaŭ
stumpigo de la finna "minä" kaj estas
kelkfoje uzata kiel mallonga formo
en la finna poezio! Por esprimi la
objekton la finna uzas kvar kazojn:
akuzativo, nominativo, partitivo kaj
genitivo, ekz. en jena frazo la formoj
multloke koincidas kun la esperantaj:
minä huomasi mustan auton = mi
rimarkis nigran aŭton, la finaĵo de
la objekto estas la sama -N, kaj la
adjektivo akordigas kun la substantivo
same!

Jen per kelkaj nesciencaj vortoj mi
volis montri ke ankaŭ ni finnoj sentas
nin tre hejme en Esperanto, kvankam
la ellerno de la vorttrezoro, se entute
ellernebla, postulas al ni ĝigantan
fortostrecon. Tamen ni bone konscias,
ke la hindo-eŭropa vortara bazo, kun
emfazo al la latinidaj lingvoj /ankaŭ la
angla grandparte pruntis siajn vortojn
el la franca!/, estas absolute sola
gusta ebleco de la mondlingvo. Ĉiukaze
Esperanto estas vortfarade tre aŭtonoma
kaj regula, evitante pletoron de
neregulaj verboj kaj fleksioj.

Min ege mirigas, kial post Zamenhof
ankoraŭ oni aŭtoras novajn planlingvojn,
kvankam Zamenhof plene sukcesis en sia
tasko krei harmonian kaj belan interlingvon,
kiu vere funkcias. Eble ili estas nur
psikopatologiaj halucinaĵoj de megalomaniaj,
sed etanimaj fantaziuloj.

J. Jäntti, Finnlando

S ESPERANTEM V ETIOPII

/O ČESKÉM KNĚHTISKÁŘI KARLU FRANT. LUDVÍKOVÍ/

Světový jazyk vzájemného porozumění
ESPERANTO pomáhal mnohým lidem při
cestách světem. Pomáhal i východočeskému
knih-tiskaři Karlu Františku LUDVÍKOVÍ,
jehož sté výročí narození si letos
připomíná pěkné východočeské město
PŘELOUČ.

Tam se K. Fr. LUDVÍK narodil, vychodil
obecnou a měšťanskou školu, vyučil se
typografem a naučil se mezinárodní jazyk,
jehož zakladatelem je Dr. L. ZAMENHOF.
ESPERANTO K. Fr. LUDVÍKOVÍ pomáhalo v
LIPSKU, kam odešel na tamní slavnou
typografickou školu, aby se zdokonalil v
řemesle.

Pak se vrátil do Čech, na pražské
Akademii studoval malířství u národního
umělce Václava SEDLÁČKA a na slavné
konzervatoři housle u prof. ULLMANNA.
Vášnivě rád fotografoval a zpíval v
různých pěveckých sborech. Ke znalosti
ESPERANTA přibyla znalost němčiny a
angličtiny. LUDVÍKOVOU životní zásluhou
bylo: Zpytl každý sám sebe a převycho-
veť se v řádného, svědomitého, poctivého,
mravného a vlasteneckého člověka.

ESPERANTO znovu pomáhalo LUDVÍKOVÍ
při cestě do Afriky, kam odjel 41 letý -
v roce 1924. Zamířil do svobodné země
Etiopie, tehdy zvané Habeš. Tam se stal
předákem v knihtiskárně a dál miloval
ESPERANTO, v němž si dopisoval a v jehož
znalostech se zdokonaloval. Vydělal si také
opravování různých hudebních nástrojů,
malování obrazů a výřezání štítů různých
obchodních firem. V hlavním městě
ADDIS ABEBE si otevřel malou tiskárnu,
v níž tiskl i úřední spisy vyslaneckví své
československé vlasti.

LUDVÍK byl nejen velkým esperantistou, ale i velkým vlastencem. Udržoval styk nejen se svými esperantskými přáteli, ale i se svou vlastí. Do českých novin a časopisů posílal články a fotografie o Etiopii. Tuto svou druhou afriickou vlast měl rád, i když tam několikrát onemocněl malárií a jinými tropickými chorobami.

V Etiopii přežil LUDVÍK deset let. Teprve v roce 1934 se vrátil do Prahy, ale se zdravím značně podloměným. Marně ho léčili v pražské nemocnici přední čeští lékaři. LUDVÍK byl trvale nemocný a po deseti letech zemřel na následky tropických chorob koncem druhé světové války v roce 1944.

Jeho pěkné, sytě barvitě obrazy z Etiopie i různé národopisné předměty z jeho sběru si můžeme prohlédnout v nově otevřeném muzeu v PŘELOUČI, který touto expozicí vzpomíná na svého významného redáka a esperantistu LUDVÍKA.

Dr. Ctibor VOTRUBEC

RESUMO: Temas pri Karlo Francisko LUDVÍK, samurbano el PŘELOUČ /ČSSR/, ĉeĥa libropresisto, vigla esperantisto kaj konata patrioto, kiu helpe de Esperanto studis tipografan lernejon en Lajpeigo kaj poste vojaĝis Afrikon.



el junulara vivo

KALENDARO POR JUNULARAJ SOMERAJ ARANĜOJ 1984

Unua duono de julio 1984:

Naturamika Tendaro de Budaĉpeŝta Medio - norda Hungario. Informas: Rezső BAROSS, Balzac u.11, H-1136 BUDAPEŝTO, Hungario.

1.7. - 11.7.1984:

Esperanta Kajaka Tendaro. La arango okazos inter la plej belaj lagoj en nord-orienta parto de Pollando laŭlonge de rivero Krutynia, kiel renkontigo de admirantoj de lagoj, naturo, floroj, ludoj, kantoj kaj amuzo. Vi logos en tendoj, mangos ĉe fajro, remos. En la programo internacia vespero, bierve-

spero, teatro k.a. Prezoj: studentoj 3.000 zlotojn, lernantoj 4.000 zl., aliaj 6.000 zl. Aligu: Studenta Esperanto-Klubo, RO ZSP, 65-001 ZIELONA GÓRA, Pollando.

1.7. - 15.7.1984:

Internacia Infana Esperanto-Urbeto, BYDGOSZCZ, Pollando. Informas: "ESPERANTOTUR", ul.M. Skłodowskiej-Curie 10, PL85-094 BYDGOSZCZ, Pollando.

7.7. - 17.7.1984:

"TENDARO ĈE MARBORDO" en Gdańsk, Pollando. Tradicia tendaro, kiun ĉiujare organizas Lodza Studenta Esperanto-Komitato. Celas allogi homojn por aktivado en la E-movado, pliperfektigi ilian lingvoscion

kaj samtempe ekkoni la faman triurbon. Programo: Esperanto-kursoj /en 4 laborgrupoj laboros progresantoj/, prelegoj pri internacia lingva komunikado, E-literaturo, orienta medicino, k.g. Kaj krome: vizitado de Gdańsk, Gdynia kaj Sopot, ŝipekskurso, naĝado en Balta maro, popoldancado, aerobio, konkurso de "GO" ludo kaj multaj aliaj distraĵoj. Aligilojn sendu al: Gregorz MOŚCIŃSKI, str. Bydgoska 15/30, PL 91-036 ŁÓDŹ, Pollando.

11.7. - 30.7.1984:

Internacia Junpionira Esperanto-Renkonto en PISANICA, Bulgario. Informo ĉe BEA.

13.7. - 20.7.1984:

Internacia Junulara Kongreso de TEJO, SWANWICK, Britio. Informas: LKK de la 40-a IJK, 140 Holland Park Ave., LONDON, Britio, W11 4UF.

15.7. - 22.7.1984:

Unua Kongreseto de la Kastora Klubo, BYDGOSZCZ, Pollando. Informas: Kastora Klubo, ul.Kłownowa 18, PL 00-591 WARSZAWA, Pollando.

30.7. - 7.8.1984:

Krakow - "Somera Esperanto-Lernejo". Se vi deziras ekkoni la malnovan, polan ĉefurbon kaj samtempe plibonigi vian lingvoscion ne prevenu al Krakow. En la programo: eksperimenta kurso de Esperanto, prelegoj pri E-movado en Pollando, E-literaturo, k.a. La programo inkluzivos: vizitadon de Krakowo, ekskursojn al Wieliczka kaj Oswiecim, naĝadon, kantovesperon, ludan vesperon ktp. Aligu ĉe: Zbigniew GRZESIAK,

3-a TURISMA JUNULARA RENKONTIĜO EN ŽDÁR NAD SÁZAVOU, ČSSR

Junulara sekcio de Ĉeĥa Esperanto-Asocio en kunlaboro kun Esperanto-klubo en BRNO arangos la 21. - 23.9.1984 jam tradicion 3-an TURISMAN RENKONTIĜON DE JUNULARO en hotelo T Á L -

str. Budryka 3/304 "A", DS 12, PL 30-072 KRAKOW, Pollando.

1.8. - 21.8.1984:

Internacia junulara laborbrigado. Plaven, Bulgario. Informo ĉe BEA.

5.8. - 19.8.1984:

Internacia junulara laborbrigado en Hungario. Informo ĉe HEA, pf. 193, H-1368 BUDAPEŝTO, Hungario.

24.8. - 31.8.1984:

Somera Studenta Esperanto-Lernejo, TORUŬ, Pollando. Tradicie jam sesan fojon studenta rondo el TORUŬ kunlaboro kun PSEK, organizas en Koperniknaskigurbo lernejon, ĉefe por studentoj, sed nature oni atendas ĉiujn volontulojn. Dum SSEL vi ne nur plibonigos vian lingvoscion, sed ankaŭ bone amuzigos. Lingvokursoj okazados antaŭtagmeze, posttagmeze estos prelegoj ekz. pri E-poezio, movado, pri astrologio kaj horoskopoj ktp. Vespere bivakfajroj, kantado, lernado de popoldancoj, interesaj ludoj, teatro.

Programo de SSEL inkluzivas ankaŭ tuttagan ŝipan ekskurson al kurorto CIECHOCINEK.

Partoprenkotizo 4.000 zlotojn aŭ 500 kronojn.


Aligilojn sendu al: Studenta Scienciga Rondo de Esperantistoj ĉe UMK, str. Moniuszki 16/20, PL 87-100 TORUŬ, Pollando.

Ĉiujn menciitajn junularajn arangojn eblas pagi pere de Ĉeĥa Esperanto-Asocio, Jilská str.10, CS 110 00 PRAGO 1 en kronoj.

SKÝ MLÝN en urbo **ŽĎÁR NAD SÁZAVOU**, Ĉeĥoslovakio.

PROGRAMO: du turismaj promenoj /35 km kaj 15 km longaj laŭ viaj kapabloj kaj intereso/, dancvespero kun muzikgrupo **BARBULO J.** Dimance prelegos s-ano Jozefo **VONDROUSEK** pri historio de moravia Esperanto-movado.

Partoprenkotizon Kcs 200,-- vi pagos al Ĉeĥa Esperanto-Asocio, Jilská str.10, CS 110 00 PRAGO 1. La aludita prezo inkluzivas logadon en hotelo, ĉiujn mangojn kaj programojn. La postpagilon kun pluj informoj sendos al vi postrevene s-ano d-ro Vladimír **ŠKODA**, Sovětská 919, CS - 685 01 BUCOVICE, Ĉeĥoslovakio.



ni recenzas

Krum Velkov: VILAĜO BOROVO

Tradukis Asen Grigorov, redaktis Violin Oljanov, eldonis Hungara Esperanto-Asocio 1983. Pagoj 130, formato 14 x 20 cm, kartonita, prezo 12 gld.

La verko rivelas al ni vivon en bulgara vilaĝo post la unua mondmilito, ĉirkaŭ la jaro 1923. La aŭtoro priskribas en ĝi povran ekziston de montaraj vilaĝanoj vivantaj en sociala misero kaj senskrupule ekspluatataj de loka ricegulo, posedanto de lignosegejo kaj vilagestro.

Ni partoprenas socialisman konsciigadon de la popolo sub gvido de juna masinisto komunisto ĝis la frakasita popolaribelo en septembro 1923, kies viktimoj fariĝas du el la tri ĉefaj herooj kune kun ceteraj ribelintoj. En dialogoj kaj alparoloj klarigas al la leganto pluraj el la marks-leninismaj principoj de la laborista-kampana reĝistemo laŭ la soveta modelo, kiun strebis establi la bulgara porsocialisma popolo post celita faligo de burĝa faŝismema monarkio. La verko, sub saĝe blanka-nigra aspekto redonas konvinke kaj strece la lukton de la malricularo.

Lingve havas la libro bonan nivelon. Preseraroj ne multas. La grafikan aspekton de la leginda libro ĝenas la iel fuŝe mane supersignitaj majuskloj. La aprezinda eldona agado de Hungara Esperanto-Asocio liveras al ni ĉi-libre interesan kaj instruan legaĵon.

István Nemere: **SUR KAMPO GRANITA.**

J. Kořínek

Originala romano. Eldonis Hungara Esperanto-Asocio, Budapeŝto 1983. Pagoj 127, formato 20 x 13,5 cm, kartonita, prezo 15 gld.

La aŭtoro disvolvas antaŭ ni psikologie-bazitajn konvinkivan travivaĵon de eksa germana oficiro Martin, kulpiĝinta dum la dua mondmilito sub cirkonstancoj per ekzekutigo de itala familio en vilaĝo Lavello pro helpo al vundita itala partizano, kiu atakis tie situigitan germanan grupeton de milit-radiistoj.

Martin dume bedaŭranta la tiaman krimon, lia opinio laudevan, fariĝis svisa ŝtatano kaj altranga oficisto de Ruĝa Kruco. Li aktivas vivriske en diversaj regionoj de ĉiuj kontinentoj dum plagoj kaj naturkatastrofoj, provante forvizi, eĉ en

35.JAROJ DE KONSTRUADO KAJ SUKCESOJ
DE SOCIALISMA AGRIKULTURO



**TERO
PANDONANTINO**

18.8. - 2.9.1984

ČESKÉ BUDĚJOVICE

KOVOVÉ METALAJ REMIZOJ GARÁŽE

el ŝtala lado - fundamenta farbot-
avolo - duparta pordego - deklina
tegmento - sen planko - facila mu-
ntado aŭ sur submuro aŭ sur ebe-
na tereno

Longo 4400 mm - prezo 4840,-Kčs
Longo 5300 mm - prezo 5350,-Kčs
Longo 6200 mm - prezo 5830,-Kčs
Largo 3030 mm alto 2450 mm estas
egalaj ĉe ĉiuj tri tipoj.

Je mendo fabrikas kaj dum malon-
ga tempo 1-2 monatoj liveras

INKLEMO

PRAHA (kooperativo)

Skribajn mendojn sendu al la adre-
so de komerca fako: INKLEMO PRA-
HA, maloobchodní úsek, 190 00 PRAHA
9, Spojovací 11, aŭ telefonu al n-ro 83 09 49.
Persone mendeblaj en Pragaj vendejoj de la
kooperativo. Transporton ni povas certigi. Re-
mizojn ni liveras nur al privatuloj.

MONDA TURISMO - Asocio por faciliga de la internacia turismo
per aplikado de ESPERANTO. Kunlaboranta asocio de UNIVERSALA
ESPERANTO - ASOCIO. En Konsultaj Rilatoj kun U N E S K O .

FARIĜU ANO DE MONDA TURISMO POR LA 1984 - a JARO!

Ĉiu esperantisto povas fariĝi individua aŭ subtenanta ano
de MONDA TURISMO. Estas du eblecoj de la anigo:

1/ INDIVIDUA ANO estos ĉiu esperantisto, kiu aktivas por
internacia ESPERANTO-TURISMO. Por pruvi tion necesas plenigi la
enkritelon kaj sendi ĝin al: "ESPERANTOTUR" - TURISMA SERVO DE
MONDA TURISMO, str. M. Skłodowskiej-Curie 10, PL 85-094 BYDGÓ-
SZCZ, Pollando.

2/ SUBTENANTA ANO estos ĉiu esperantisto, kiu pagos al lan-
da reprezentanto de MONDA TURISMO egalvaloron de 10 int. res-
pondkuponoj. La adresaro de landaj reprezentantoj aperas sur
la lasta kovrilpago de "ESPERANTO EN TURISMO". Se en via lando
mankas landa reprezentanto, kandidatigu vi mem por tiu funkcio,
aŭ sendu 10 int. respondkuponojn al iu el la estraranoj de MON-
DA TURISMO. En ĉiu kazo konigu viajn nomon kaj adreson ankaŭ al
"ESPERANTOTUR" - TURISMA SERVO DE MONDA TURISMO, str. M. Skło-
dowskiej-Curie 10, PL 85-094 BYDGOSZCZ, Pollando.

Ĉiuj individuaj kaj subtenantaj anoj de MONDA TURISMO rice-
vos en la 1984-a jaro senpage: kvar numerojn de "ESPERANTO EN
TURISMO" - 1984, "TURISMAN ESPERANTO-KALENDARON" kaj turismajn
Esperanto-ofertojn, kaj ankaŭ 20% rabaton por aligi al la KON-
FERENCO DE MONDA TURISMO okazonta ĉi-jare en BYDGOSZCZ.

MONDA TURISMO BONVENIGAS VIN!

La Estraro de MONDA TURISMO

ESPERANTOTUR

STR. M. SKŁODOWSKIEJ
CURIE - 10

PL-85-P94 BYDGOSZCZ

POLSKO

ENKETO DE INDIVIDUA ANO DE MONDA TURISMO POR LA 1984-a JARO

Nomo:

Antaŭnomo:

Naskiĝjaro:

Jaro de esperantistigo:

Kompleta korespondadreso

/kiel skribenda sur kovertoj/:

Telefono - hejma: - ofica:

Profesio: Edukiĝo:

Ĉu vi estas

- fakdelegito de UEA

pri turismo?

- turisma informanto?

- turisma vojaĝgvidanto?

- turisma Esp.-ĉiĉerono?

Via funkcio

- en la Esp.-movado:

- en turismo:

Kiujn aliajn turismajn kvalifikaĵojn vi

havas?

Kion vi faras por turismo kaj specife por

internacia Esperanto-turismo?

.....

.....

.....

.....

Loko - Dato:

.....

Subskribo:

sia konscienco, per tia bonagado sian kulposenton. Alternaj ĉapitroj metas nin jen en la pasinteco, en tiujn tagojn tragediajn antaŭ 24 jaroj, kiam la aliancanoj liberigadis desude Italion kaj la germanaj okupaciintoj sin kruele defendis ĉe per amasmurdoj al italaj partizanoj.

Jen en la nuntempa tago, kiam Martin, malkovrita far la preso, decidis prezenti sin al la vilaganoj de Lavello por sin iel senkulpi kaj klarigi al ili neprecon de sia siatempa konduto kaj akcepti ĉe kondamnon anoncanta sin samtempe al la itala polico.

La romano provas en filozofiaj rezonoj sekci la kruelecojn de militoj. Provas montri, ke la barbaraj fiaĵoj kaj amasmurdoj de germana fasismo trovis siajn imitantojn kaj trovas ilin ĉe nun. La aŭtoro per neniel blanka-nigra pentrado volas montri ke en la absurdo de milito iam ĉe homoj ne nepre fikaraktaraj farigas krimfarantoj...

La romano havas artisman nivelon kaj ankaŭ ĝia lingvaĵo estas tre bona. Enestas tre malmultaj preseraroj. Tiun ĉi absorban kaj pensigan bonan pliricigon de nia literaturo mi povas al ĉiu varme rekomendi.

J. Kořinek

Ivan Skála: ILI VENAS TIEN ĈI

Apreso far nacia artisto Ivan Skála, prezidanto de Asocio de Ĉeĥaj Verkistoj. Disponiginte numeron de PONTO kun mia traduko de lia poemo "Ili venas tien ĉi" al Majstro Ivan Skála, mi ricevis jenan dankleteron:

Estimata kamarado,

mi volus al vi kore danki por la kara letero kaj por la sendita numero de Esperanta gazeto PONTO.

Mi gojis pro ĝi ne nur por mi, sed antaŭ ĉio tial, ke tio estas unu el vojoj, kiel povas en la mondon veni voco de nia progresema literaturo, al kiu ĝuste pro ĝia enhavo estas en pluraj landoj en vojon starigataj barieroj.

Refoje mi al vi do dankas kaj deziras al vi en via meritplena laboro multan sukceson.

Kun amikaj salutoj

Ivan Skála, p.m.

J. Kořinek

Ēva Tófalvi kaj Oldřich Kníchal: KIUJ SEMAS FLORANTE ...

Psikologia, intima romano, kvazaŭ taglibro de la protagonisto, kiu rakontas pri siaj viveventoj kaj siaj psikaj sintenoj kaj reagoj al la vivo. La aŭtoroj montras, kiel homo povas erarvagi sub la influo de politika ideologio - ĉi-kaze naziismo - ĝis perfido al siaj kunhomoj kaj ĉe intimuloj. La stilo estas modera, sen superflua precizigo. La konstruo estas kohara, ne dispecigas en ĉapitrojn. Personecaj karakterizoj estas sukcesaj, sociaj kaj politikaj eventoj klarigas el ĉe efikantaj dialogoj kaj sobraj evidentigoj.

La verko gajnis la unufojan Premion Raymond SCHWARTZ - por proza fikciaĵo en 1980!

Eldonis Universala Esperanto-Asocio. La libro estas broŝurita kun dukolora plastumita kovrilo, speciale desegnita de

Franko Luin. La formato estas A5 /210 mm/ kun 108 paĝoj, inkluzive de biografioj pri la aŭtoroj. Prezo: 15,00 gld. de la Libroservo de UEA /plus 10% por sendokostoj; rabato de unu triono por minimume tri ekzempleroj/.

Eldona Fako de UEA /gs/

el leterkesto

Covasna, 1984-04-14.

Permesu, ke mi esprimu mian gratulon kaj bondezirojn al la cefredaktoro kaj al ĉiuj redakcianoj de via STARTO. Okaze apero de la jubilea 100-a numero mi deziras al vi ĉiuj fruktodonan agadon ankaŭ dum es-
tonto por nia zamenhofa ideo!

Vivu eterne nia amikeco k. mondpaĉo! Dezirante agrablan kaj gajan Paskon elkore salutas vin
via

d-ro Gábor Lázár,
Covasna, Rumanio.

Kluĵ-Napoka 1984-04-11.

Estimataj gesamideanoj!

Enkadre de la "Internacia Komunikala Jaro" la Distrikta Biblioteko CLUJ kun helpo de kluĵaj geesperantistoj organizis pasintdecembre la ekspozicion "ESPERANTO - mijloĉ de komunikado internacia" - Esperanto - internacia komunikilo. Pri ĝi skribis la loka gazetaro kaj parolis Radio Bukareŝto, kiu ĉi-jare parolis denove pri Esperanto.

La rumana poŝto peras por la intereso de la jenajn E-periodaĵojn: Der Esperantist, El Popola Ĉinio, Pola Esperantisto, Bulgara Esperantisto, Paco, Hungara Vivo, Juna Amiko kaj Világ es Nyelv. Aliaj E-revuoj estas haveblaj pere de landaj perantoj.

Bonvolu akcepti, karaj ge-

amikoj, mian koran saluton kaj niajn gratulojn okaze de la 100-a numero de STARTO.

Dauran sukceson

Ionel-Jeanell ONET
Pk.1112
RO-3400 CLUJ-NAPOCA
Rumanio

El latero de Venezuelo:

Maracaibo, 84-04-05

Mi denove informas pri la E-movado en la urbo MARAKAJBO en Venezuelo. En decembro 1983 fondiĝis ĉi tie la MARAKAJBA ESPERANTO-KLUBO kaj samtempe aperis la informilo de nia klubo: MARAKAJBA STELO.

La klubanoj elektis min kiel prezidanto de la klubo kaj la redaktoro de nia informilo. Ankaŭ ni en Marakajbo memori-
gis la 124-an datrevenon de la naskiĝtago de ZAMENHOF. Ni havis simplan sed tre belan feston. UNUAFOJE ĈI TIE!

La klubanoj deziras perfektigi en la Internacia lingvo. Ili volas legi E-librojn, revuojn kaj broŝurojn. Ĉu vi povas sendi tiujn legomaterialojn?

Kelkaj samideanoj ankaŭ deziras lerni la ĉeĥan lingvon. Ĉu ekzistas Esperanta - ĉeĥa vortaro? Ĉu estas similaj la ĉeĥa kaj la slovaka?

Bonvolu informi en via organo STARTO pri nia agado. Karaj samideanoj, mi denove salutas vin

via

David G. VALECILLOS V.
Calle 79 No. 3C-72
MARACAIBO - 4002
VENEZUELA.

EKSTERLANDANOJ PRI LA "HISTORIO" DE S. KAMARŬT

D-ro Erich Dieter KRAUSE/Universitato Leipzig: "La Historio estas ege valora / kaj detalega! / verko. Mi estas tre kontenta, ke mi ĝin posedas."

Ed BORSEBOOM /Teknika Altlernejo en Utrecht, Nederlando/: "Jam parton el la "Historio" mi legis kun granda intereso. Kaj mi tuj aldonas, ke ĝi estas grava kaj bonege verkita dokumento. Mi gratulas hazardon, ke mi ĝin ricevis, ĉar funde de mia koro mi estas historiisto. Kia kolosa nur la editorado!" /BORSEBOOM estas aŭtoro de biografioj pri LANTI kaj A. ĈE, fondinto de "Societo ANDREO ĈE"./

/J.M./

HUNGARA
ESPERANTO-ASOCIO

Budapeŝto, 1984-03-08

Al la redakcio de STARTO.

Estimata Redaktoro!

Ĉi-kune ni sendas al vi la tekston kaj muzikon de niaj kantoj VANKUVERO VIN BRAKUMAS kaj GIS REVIDO, kiujn ni verkis por la 68-a UK en Budapeŝto. Tie la kantoj estis prezentataj kun bela sukceso - tion povas pruvi la partoprenintoj mem. La tekston ni modifis por Vankuvero kaj Augsburg.

Nia intenco estas servi per tiuj kantoj la varbadon al la 69-a Kongreso, tial ni sendas ilin al la Esperanto-gazetaro kun la peto aperigi ilin. La kantojn en Vankuvero cetere prezentos versajne koruso dum UK.

Se via gazeto pagos honoraron por la aperigo, tiun sumon ni donacas el la fonduso por Esperanto-pacagado en via lando.

Kun koraj salutoj
Irene SZABÓ László ZSOLDOS
verkinto de la komponisto
tekstoj BUDAPEŝTO
BUDAPEŝTO Somló u. 50/a
Dózsa György H - 1118
u.64
H - 2011

RADIO POLONIA, ESPERANTA REDAKCIO, VARSOVIO, POLLANDO

Ekde la 13-an de majo 1984 RADIO POLONIA, Esperanta redakcio, havas por vi novan kaj utilan programon. Ĉiu dimanĉo en matena elsendado - je la 7,30 horo de goma tempo - vi povas informi pri konkreta apliko de Esperanto en la scienco kaj tekniko!

Ni atentigas vin ankaŭ pri pluaj diversaj novaj Esperantaj programoj de RADIO POLONIA.

Al ĉiuj, kiuj skribos kaj deziras ricevi detalan program-informilon RADIO POLONIA tuj sendos ĝin senpage.

Adreso:
RADIO POLONIA, Esperanta-redakcio, VARSOVIO, Pollando.

V BORU SE JIŽ ZAČALO!



Ano, v Boru jsme začali s přestavbou starého objektu, který byl převzat od zaniklé MS našeho svazu v Boru u Tachova. Jedná se o dům více než 100 let starý. Přestavbou se získají prostory a více než 30 lůžek, společenskou místnost, prostornou kuchyň sociálním vybavením ve všech poschodích. I když nyní objekt neskýtá zrovna vábný vzhled/ museli jsme ho částečně demolovat/ všichni kdož tam až dosud pracovali jsou rozhodnutí v činnosti nepolevit a pokračovat. Díky těmto nadšencům/ v době psaní tohoto článku zejména z Ostravska, Mělnicka a z okolí Č. Budějovic z nichž část jsou mladí členové svazu/ by měla budova ještě v letošním roce " vyrůst " asi o 2 metry, dostat novou střechu a tak být připravena k rekonstrukci druhé poloviny domu, kterou s vaší pomocí, jak doufáme, dokončíme v příštím roce.

Otevření tohoto střediska rekreace, turistiky a výchovy bychom chtěli provést v roce 1986, tedy v předvečer 100. výročí vzniku esperanta. Myslíme si, že by to byl hezký dárek jak pro náš svaz tak i pro celé světové esperantské hnutí.

Proto vás žádáme znovu, abyste se zamysleli nad vašimi možnostmi a sdělili nám, kdy byste chtěli pomoci. Svaz může uhradit cestovné těm kdož budou v Boru pracovat alespoň tři plné dny. Příspěvek na stravování provádíme dle platných směrnic, to je 32,- Kčs za den + snídaně, které zajistíme přímo v místě stavby. Ubytování je skromné, přímo v domě, maximálně pro 6 osob. Hleste se i na období zimy, kdy budeme provádět vnitřní instalační a kompletační práce. Na fotografii je náš objekt těsně před zahájením prací uprostřed dvou obytných domů. Jeho budoucí podoba by měla být co do velikosti jako objektu po levé jeho straně.

- kým -

INFORMOJ EL SEKRETARIEJO

JARNÍ MÍROVÝ POCHOD V JABLONCI NAD NISOU

Dne 21. dubna 1984 se konal v Jablonci nad Nisou 12. ročník Jarního mírového pochodu na trasách 15 km, 25 km a 35 km, kterého se celkem zúčastnilo 398 osob z 27 míst ČSR a esperantisté ze tří klubů v NDR: Hoyerswerda, Reichenbach a Görlitz. Po zdravotně dopisy poslali přátelé z PLR a z dalších míst NDR.

Mírový pochod se konal pod záštitou Okresní mírové rady a letos se záštitou poprvé také podílel Městský výbor národní fronty v Jablonci nad Nisou, který přispěl zvláštní cenou.

Rezoluci Okresní mírové rady podepsali všichni účastníci a byla odeslána Československému mírovému výboru v Praze. Pochod natáčela Čs. televize a byl uveden dne 3. května 1984 v oblastním zpravodajství. Natáčel i okresní filmový týdeník "Větriny Jablonecka". Akce měla značnou publicitu i ohlas mezi veřejností a proběhla za účasti téměř všech členů Klubu esperantistů v Jablonci nad Nisou jako pořadatelů a organizátorů.

Cenu Českého esperantského svazu pro nejpočetnější zastoupený esperantský klub nebo kroužek obdržel KK Jablonec n.N. Cenu pro nejpočetnější kolektiv - pohár MěstVNF Jablonec n.N. - dostal turistický kroužek TJ ELITEX z Liberce. Ceny /poháry/ Okr. mírové rady obdržel:

- 1/ Turistický oddíl pionýrů z PS Obránců míru při 7. ZŠ Jablonec n.N.;
- 2/ Kolektiv esperantistů z REICHENBACHU v NDR;
- 3/ Kolektiv esperantistů z HOYERSWERDY v NDR.

Přátelského večera v sobotu dne 21. dubna 1984 se zúčastnili zahraniční hosté i zástupci přítomných klubů z ČSR / Praha, Liberec, Jaroměř, Karlovy Vary/.

E-resumo: Temas pri la 3-a PRINTEMPA PACA MARŜO EN JABLONEC n. N., Ĉeĥoslovakio, la 21-an de aprilo 1984, kiu estis, ni povas diri, plejparte junulara. Partoprenis geesperantistoj de EK Hoyerswerde, Reichenbach, Görlitz /GDR/ kaj Prago, Liberec, Jaroměř, Karlovy Vary, Jablonec n.N. /ČSR/.

ASTRONOMO JIŘÍ GRYGAR RESPONDAS AL NIA LEGANTO

Unu el niaj legantoj sendis al la populara televida lekcio pri astronomio, d-ro Jiří GRYGAR, kiel memorajon pri lia lekcio, en kiu graven rolon ludis Prof. Albert EINSTEIN, la Esperantan revuon "HOMO KAJ KOSMO" /1 - 2/1983/ kun bela kolora foto de EINSTEIN meze

de galaksioj, krome kelkajn demandojn kaj sugestoj elpensi pluan TV-programon.

La astronomo respondis i.a.: "Mi kore dankas pro la letero kaj ankaŭ la ekzemplero de HOMO KAJ KOSMO. Kiom mi komprenas la tekston, mi vidas, ke la gazeto estas verkata sur tre

akceptebla nivelo."

Post klarigoj, ekz. pri la Einsteina aserto pri neekzisto de gravito en la kosmo - tiun la Relativeco sangis al la nocio "Kurbigeo de la spacotempo", kauzata de ajna enkosma materio - kaj tuŝante eventualan rilaton inter la rapideco de fotono / lum-partiklo / kaj eterneco, li aldonas: "Mi scias pri la ekzisto de la planedeto /n-ro 1462/ "ZAMENHOF", sed pri la ekzisto de "ESPERANTO" /planedeto n-ro 1421/mi

sciigis nur el via letero, same kiel pri la kosmonauto - esperantisto Bertalan FARKAS. - Estas tre agrable de vi, ke vi skribis al mi tian edifan leteron.

Tio min konvinkas, malrapide, ke mi tamen ankoraŭfoje, iam, revenu en la Televidon, eĉ se mi disponas, en la tempo-pasado, ĉiam malpli multe da tempo.

Salutas Jiří GRYGAR".

/J.M./



STARTO - presorgano de Ĉeĥa Esperanto-Asocio, Jilská strato 10, 110 00 PRAGO 1, Ĉeĥoslovakio. Aperas 6 foje jare. Responda redaktoro Zdenko KRIMSKÝ. Grafika aranĝo Milan LABAŠTA. Desegnaĵoj Pavel RAK. Transdonita al presejo la 15-an de junio 1984. Jarabono Kčs 24,--, por eksterlando Kčs 36,-- aŭ 10,50 gld, inkluzive sendkostojn. Abonantoj turniĝu al niaj perantoj, al UEA aŭ rektvoje al nia asocio.

STARTO - nepravidebln vĉstnĭk Ĉeskĕho esperantskĕho svazu, Jilská ul. 10, 110 00 PRAHA 1, vydávaný pro potřebu členů svazu. Vychází 6x ročně. Odpovědný redaktor Zdenko KRIMSKÝ, Grafická úprava Milan LABAŠTA. Kresby Pavel Rak. Tisk zajišťuje technické ústředí knihoven, Praha. Předáno do tisku dne 15. června 1984. Roční předplatné Kčs 24,--, pro zahraničí Kčs 36,-- nebo 10,50 guldenů, včetně poštovních výloh. Dohledací pošta Praha 07. Snížený poplatek za poštovně povolen Ředitelstvím pošt Praha pod č. jedn. P/1 - 1267 ze dne 6. dubna 1979.

Výtvarná řemesla Praha
Vám nabízejí široký sortiment bytových doplňků a dárkových a upomínkových předmětů, vyráběných převážně v malých seriích s častou inovací.



Nabízíme:

soustružené mocca soupravy
soustružené odkládací stolky
malované porcelánové soupravy i jednotlivé kusy
malované a broušené vázy, misky a popelníky
výrobky z cínu
bižuterii kovovou a koženou
a další sortiment z kovu, kůže, koženky, textilu.

Adresy prodejen upomínkových a dárkových předmětů:

110 00 Praha 1, Národní tř. 37	22 41 94
110 00 Praha 1, Vodičkova 28	24 47 71
110 00 Praha 1, Spálená 39	29 27 04
110 00 Praha 1, Na poříčí 35	23 17 315
110 00 Praha 1, Křížovnické nám. 2	26 63 28
120 00 Praha 2, Anglická 18	25 98 56
110 00 Praha 1, Lazarská 5	29 83 22
110 00 Praha 1, Železná 12	22 79 14
170 00 Praha 7, Obránců míru 17	37 44 84
110 00 Praha 1, Můstek - stanice metra	26 14 19
360 00 Karlovy Vary, Mariánská 2	930/28 381

Vzorkovna nábytku:

110 00 Praha 1, Václavské nám. 41	26 40 64
přijímá objednávky na individuální zakázky nábytku a byt. doplňků.	

V našich prodejnách
naleznete vhodné dárky
pro každou příležitost.
Naše pracovnice Vás
ochotně obslouží
a pomohou vybrat
předmět,
který potěší.

Český esperantský svaz

110 01 PRAHA 1, Jilská 10

Noviny

DOHLÉDACÍ POŠTA PRAHA 07,

SNÍŽENÝ POŠTOVNÍ POPLATEK

POVOLEN ŘEDITELSTVÍM POŠT PRAHA

J.ZN.P/1 - 1267/79 ZE DNE 6.4.1979